

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

FELIĈAN NOVJARON!

Els esperantistes catalans
tenen l'obligació moral
d'adherir-se a U. E. A.
per mitjà de la K. E. F.

NOVEMBRO-DECEMBRO 1935

N-ROJ 222-223

Hi ha una manera indirecta de protegir la
FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA:
Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 llibrets al preu de 25 cèntims exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20% de descompte.

Zamenhof-disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.è Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona 1909. L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'esperanto. (Esgotat)

Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per Jaume Grau Casas. Gramàtica i Vocabulari Esperanto-Català, 170 pàgines. Preu: 3'50 ptes. Descomptes als grups i revenedors.

Adreceu-vos a

CARRER VALENCIA, 245 - BARCELONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

OFICIALA ANGULO

Ni progresas

Antaŭ unu jaro, sub tiu ĉi sama rubriko, ni publikigis skizon pri nia federacia stato kaj ni povis konstati tiam, ke la nombro de niaj membroj kreskas iom post iom. Hodiaŭ ni povas raporti al niaj amikoj kaj legantoj la kontentigan fakton, ke de 250 membroj en la komenco de la jaro ni transiris al 350. Kvankam tiu nombro ne estas la celo de nia agado, ni tamen fieras, ke nia afero ne stagnas kaj ke kredeble en baldaŭa tempo ni atingos la dezirindan 500.

Tiu ĉi rezultato estas duoble atentinda, tial ke la tutan moralan kaj materialan subtenon ni ĉerpas nur el nia movado mem, sen ia oficiala kunhelpo aŭ subvencio. Ĝuste subvencio, kiun ĝuas Hispana Esperanto-Asocio, ni povas tion diri malkaŝe, estas danĝera kaj malagrabra konkurenco, tial ke la nomita Asocio donas subpreze, dank'al la mono, kiun ĝi ricevas el la ŝtata budĝeto, cetere nutrata de niaj poŝoj, gazeton kaj broŝurojn. Ni ja ne volas plendi, ke esperantista organizaĵo ĝuas ŝtatan subvencion, sed eble oni povas permesi al ni proteston, ke tiun monon oni uzas ne por la ĝenerala propagando sed tiamaniere, ke ĝi kaŭzas malutilon al aliaj organizaĵoj, kiuj sen tio disvolviĝus pli bone.

Spite tiuj baroj kaj aliaj pri kiuj hodiaŭ ni silentas, sed kiujn ni devos publike ataki post kelka tempo, ni estas sur bona vojo.

Membrokartoj

Je la fino de novembro ni sendis al ĉiuj novaj membroj de 1935 la membrokarton de U. E. A. kun la servokuponaroj, kiuj estas validaj ĝis ricevo de tiuj de 1936, dissendotaj en la komenco de la jaro.

La novaj membrokartoj estas surprisitaj per la nomo de K. E. F. kaj kiel tiuj de 1934 surstampitaj. Tial la membrokarto legitimas la posedanton kiel membron de U. E. A. kaj K. E. F.

Se iu membro ne ricevis la nomitan karton, li povas sin turni al nia sekretario por esploro de la kaŭzo kaj eventuala korekto sebezone.

Kunlaborplano

Nia devizo estis unuigo kaj ni ne bedaŭras, ke lojale ni batalis por ĝi. Ĝi donis kontentigan rezultaton de multaj flankoj kaj aliajn tiel bonajn ni certe ricevos ankoraŭ. Sed dum ni predikis kunlaboremom kaj sincere etendis la manon al ĉiu, aliaj preparis embuskon kaj kiel tretindaj serpentoj volis piki niajn kalkanojn. Proverbo diras: unu ovo malbona tutan manĝon difektas. Ni scias, kie estas tiu ovo kaj ni ĵetos ĝin sur la vizaĝon de la fizike kaj morale sensignifa malamiko, kiu ĝis nun komprenis predikon, kiel bovo muzikon.

La Komitato de K. E. F. submetos sian planon al la reprezentantoj de siaj membroj kaj laŭ la decidoj ĝi eltenos novajn frapojn aŭ ĝi komencos abundan disdonon.

Administrato

Ni petas tiujn membrojn kaj abonantojn, kiuj ne pagis ankoraŭ la kotizojn de 1935, ke ili kvitigu siajn ŝuldojn en baldaŭa tempo. Per tio ili grave helpos la klopodojn de nia kasiso.

XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso

31 majo, 1 kaj 2 de junio 1936. — Manresa.

La Organiza Komitato de la Kongreso en Manresa konsistas el la jenaj samideanoj:

Prezidanto: Sro. Antoni Muset.

Vicprezidanto: Sro. Josep Calmet.

Sekretario: Sro. Jesús Prat.

Kasisto: Sro. Joan Ferrer.

Voĉdonantoj: Sro. Pere Saumell, Sro. Josep Coma kaj fraŭlino Maria Guilà.

La O. K. interkonsente kun la Komitato de K. E. F., decidis starigi garantian kapitalon por eventuala deficino. Ĉiu bonvola samideano estas petata promesi pagon de dek pesetoj maksimume. En okazo de deficino oni postulos la proporcie necesan sumon el la promesita pago.

La O. K. fiksas la jenan provizoran kongresprogramon:

31 majo. — Je la 9,35, Alveno; je la 10,30, Akcepto ĉe la Urbdomo kaj Malferma Kunsido; je la 12, Internaciaj Floraj Ludoj; je la 14, Festeno; je la 17, Ekspozicio; je la 17,30, Labora Kunsido kaj je la 22, Koncerto.

1 junio. — Je la 9, Vizitoj; je la 12, *sardanoj* kaj Ekzamenoj; je la 16, Ferma Kunsido; je la 18, Prelego kaj je la 22, Amatoraj Filmoj.

2 junio. — Ekskurso al Santuari de Queralt.

La definitivan programon oni publikigos en la antaŭkongresa numero de KATALUNA ESPERANTISTO.

Adreso de la Organiza Komitato: XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso, strato Piques, 1. — Manresa.

XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Eksterordinaraj Premioj

Ni ricevis la sekvantajn premiojn kaj ni esperas, ke pli multaj alvenos. Kompletan liston tre verŝajne ni povos publikigi en nia proksima numero.

IV. Premio de la grupo «Bela Espero» el Manresa, 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

V. Premio de Sro. Antoni Muset, Prezidanto de la Kongresa Org. Kom., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VI. Premio de la Urbestro de Manresa, 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VII. Premio de Sro. Francesc Bertran, ano de la grupo «Bela Espero», 50 pesetoj. Temo: «Laŭdo al la kiso».

VIII. Premio de Sro. Josep Senyal, deputito el Manresa, 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

IX. Premio de la ekskursista grupo «Endavant» el Manresa, 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

Eduard Capdevila, *Sekretario*.

28 Universala Kongreso de Esperanto

8.—15 de aŭgusto 1936, en Wien

Adreso: Esperanto-Kongreso, Wien, I. Neue Burg.

Kotizo en svisaj frankoj aŭ egalvaloro: por kongresanoj 28.—, por familianoj 18.—, por gejunuloj malpli ol 18 jaraĵoj 12.—. «Helpkongresanoj» (grupoj, societoj, institucioj, firmaoj, kiuj deziras montri sian simpatian al la kongreso, por helpi ties sukceson kaj por ricevi ĉiujn kongres-dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton) pagas svis. fra. 12.

Favorkotizoj por frupagantoj: ĝis 31 de januaro 1936 sv. fr. 20.—, 12,50 kaj 8,25; ĝis 30 de aprilo 23.—, 14,25 kaj 9,50; ĝis 30 de junio sv. fr. 25.—, 16.— kaj 10,50.

Glumarkoj: Tre belaj glumarkoj en 5 koloroj po 100 svis. fr. 0,70.

Kongresafiŝoj: 2 ekzempleroj kune kun 3 belegaj gvidlibretoj kontraŭ 1 poŝta respondkupono.

Radio-dissendoj: Komencante la 2 de oktobro okazos ĉiun merkredon de la 18 h. 30 ĝis la 19 h. Radio-Esperanto-kurso el Radio — Wien. Je la fino de la kurso, do proksimume de la 18 h. 50 aŭ 18 h. 55 ni komunikos ĉiun merkredon informojn pri la Kongreso, eventuale respondos demandojn.

Aliĝoj: Jam aliĝis pli ol 170 gesamideanoj el diversaj landoj.

Avantaĝoj de fru-aliĝo: Ricevo senpaga de la kongres-gazeto Aŭstria Esperantisto jam de l' monato de la aliĝo; pli bona sidloko en la teatro por la prezentado de l' opereto «La Blanka Ĉevaleto»; certigo de sidloko kaj de partopren-ebleco en la Turisma Servo «Tra Aŭstrio», ĉar nur certa

nombro povos partopreni en ĉi tiu unika vojaĝo kaj tiel malmultekosta.

Tra Aŭstrio: Por tiuj samideanoj, kiuj ne sufiĉe frue aliĝos al «Tra Aŭstrio» aŭ ne deziras partopreni en ĝi, la aŭstria forvojo kaj ŝipkompanio estas je dispono je rabatita prezo. Detaloj sekvas. Tiuj s-anoj kompreneble ne vidos tiom kiom la aliaj. La prezo por ĉi tiu 7 taga ekskurso A estas svis. fr. 124.—, 115 aŭ 109— laŭ la kvalito de la noktigejoj. Enkalkulitaj estas reveturado, vizitoj, prezentadoj dumvoje, bonaj kaj sufiĉe abundaj manĝaĵoj. Vegetaranoj ricevos senviandan bonegan menuon.

Restado en Wien kaj Aŭstrio sufiĉe malmultekoste aranĝota de LKK.

Fervojrabatoj: En Aŭstrio 25% rabato sur la fervojoj; sur la ŝipoj pago de unu vojo por tien kaj reen-veturadoj. Konsilu kaj helpu atingi rabatojn sur la fervojoj de la traveturotaj landoj!

Kontraŭ intern. poŝta respondkupono ni sendos la belan varbnumeron kun 3 belaj gvidfolioj. Aliĝu baldaŭ kaj per tio faciligu al ni la laboron!

La kongreskartojn ni dissendos fine de 1935 (plej malfrue.!).

LKK de 28-a Univ. Kongreso de Esperanto, Wien, Neue Burg.

NEKROLOGO

La 15-an de oktobro mortis nia samideano Jaume Pallejà, kiu en la vicoj de Enciklopedia Akademio Espero laboradis kun granda entuziasmo por nia afero. La morto forrabis lin el nia kampo, kiam tiom da fruktoj ni povis esperi el lia fervoro kaj diligenteco.

Nia pioniro Esteve Rei, eksprezidanto de Barcelona Stelo kaj iama kompetenta komitatano de KEF, mortis en la lasta tempo.

Vicenç Andrés, kiu antaŭ du jaroj dividis kun ni la laboron en la federacia komitato, forlasis nin por ĉiam, post kruelela operacio.

Al ĉiuj familianoj de niaj malaperintoj ni esprimas nian plej sinceran kondolencon.

FRANCAJ KAJ JAPANAJ PIONIROJ

En Esperantujo nuntempe plej efike laboras por triumfigo de Esperanto francaj kaj japanaj samideanoj, ne nur agante tre eminente per lingvaj kaj gramatikaj pristudoj, sed ankaŭ klopodante vere multe por disvastigo de nia helpa lingvo kaj organizigo de nia movado. Kvalite kaj kvante elstaras en nia mondo pacaj batalantoj el la grandaj landoj Franca kaj Japana, okcidenta kaj orienta.

Ni deziras tion rimarkigi kiel laŭdindan ekzemplon. Ni ne forgesas grandajn meritojn de aliaj popoloj kaj nacioj. Sed estas vere elokventa por nia afero la fakto ke franclingvanoj, t. e., nacioj kies lingvo ludas privilegian rolon, tiel fervore batalas por sukcesigo de neŭtrala lingvo internacia. Tiu ekzemplo memorigas nin pri la historio de homaraj militoj, kiuj ne ĉiam sekvas al lingvaj aŭ naciaj diferencoj. Ni atentu ke germanlingvanoj, t. e., lingvaj samnacioj: aŭstria, prusa, svisa ne ĉiam pace kunvivis, ne ĉiam bone interkonsentis; ankaŭ lingvaj samnacioj francaj, belgaj kaj svisaj ne unuiĝis por politika samnacieco. Kaj tamen politike interkonsentis svisaj diverslingvanoj. Do politika unuiĝo ne ĉiam korespondas al lingva nacieco, ne ĉiam popoloj batalas aŭ disiĝas pro lingvaj diferencoj. Esperanto ne estas magia rimedo por paco. Tial Zamenhoj verkis pri homaranismo, teorio aŭ doktrino, organizo aŭ eduko por interpacigi la homojn. Esperanto prezentas *unu* el la helpiloj aŭ faciligiloj al ĉiaj homaraj progresoj.

Paco postulas senton aŭ impreson pri justeco. Neŭtrala lingva fundamento donas tiun senton aŭ impreson pri lingva justeco. Dank' al Esperanto povas malaperi *unu* el la kaŭzoj de interhoma maloportuno aŭ malamikeco. Jen eblo, jen celo, jen idealo kiu meritigas klopodon de ĉiu bonvola homo, eĉ de ĉiu homo kiu egoiste deziras eviti malpacon aŭ maltrankvilon.

Kaj se tiun lingvan justecon celas kaj porlaboras tiuj homoj, kies lingvo ĝuas superecon kaj privilegion, ili estas des pli laŭdindaj kaj meritaj: tiaj estas esperantistoj francaj, anglaj, germanaj, japanaj, hispanaj, italaj, rusaj kaj aliaj nuntempe privilegiaj lingvanoj. Katalunoj kaj finnoj, norvegoj kaj hungaroj, estonoj kaj irlandanoj, k. t. p., estas multe pli logike devigataj klopodadi por sukcesigo de neŭtrala komuna helpa lingvo.

DELFI DALMAU, L. K.

ris (aŭ igis) ŝin ruĝigi (anstataŭ ruĝiganta). Mi aŭdis ŝin kanti (anstataŭ kantanta). Mi vidis la knabojn ludi (anstataŭ ludantaj)».

El ĉi tiuj ekzemploj mi elĉerpas la lastan, kaj en ĝi mi ŝanĝas la infinitivon ludi per bati.

Tiel ni ricevas la jenan propozicion: Mi vidis la knabojn bati.

Ĉu ĉi tiu propozicio estas korekta kaj klara? Neniel; ĉar ĝi estas duba.

La unua kaj plej supera esperanta gramatika regulo estas la klareco, kaj per la propozicio «Mi vidis la knabojn bati», oni ne scias ĉu la knaboj estas «batantaj» aŭ «batataj».

Jen du klaraj propozicioj:

Mi vidis la knabojn batantaj;

Mi vidis la knabojn batataj.

La du vortoj, «batantaj» kaj «batataj», estas predikataj participoj de la estanta tempo.

Oni ne povas redukti la du proponitajn propoziciojn al unu, nome: Mi vidis la knabojn bati.

Kial, do, oni pretendas anstataŭi la predikatajn estantajn participojn per infinitivoj?

* * *

En lingvoj naturaj (mi celas katalunan kaj hispanan lingvojn) oni ne povas diferencigi la adjektivojn kaj la participojn atributajn de la predikataj, nek montri (escepte, nur en tre maloftaj okazoj) la aktivecon nek la pasivecon de la participoj.

Ekzemploj:

Esperantaj: 1—«Lasu la teleron puran». 2—«Lasu la teleron pura». 3—«Petro vidis la birdojn pentritajn». 4—«Petro vidis la birdojn pentritaj». 5—«Oni vidis la kuniklojn manĝantaj». 6—«Oni vidis la kuniklojn manĝataj».

Hispanaj: 1+2= «Deja el plato limpio». 3+4= «Pedro ha visto los pájaros pintados». 5+6= «Se ha visto comer los conejos».

Katalunaj: 1+2= «Deixa el plat net». 3+4= «Pere ha vist els ocells pintats». 5+6= «Hom ha vist menjar els conills.».

Komparu la lingvan riĉecon de Esperanto kun tiu de la du cititaj lingvoj, kaj atentu ĉu oni akirus grandan profiton, se oni dirus «Oni vidis la kuniklojn manĝi» anstataŭ la 5-an kaj 6-an ekzemplojn, same kiel hispan — kaj katalunlingve.

* * *

Nun ni iru al la unua ekzemplo, proponita de D-ro. Lippman: «Ni lasu lin kuŝi».

Ĉu ĉi tiu propozicio estas korekta?

Jes; ĝi estas korekta, sed neniel samsignifa al «Ni lasu lin kuŝanta».

La propozicio «Ni lasu lin kuŝanta» signifas: en la preciza momento, kiam ni lasas aŭ lasos lin, li estas en horizontala kaj ripoza situacio, ĉu li volas aŭ ne; en ĝi oni nur konstatas la staton de li, kiam ni lasas aŭ lasos lin».

La propozicio «Ni lasu lin kuŝi» signifas: ni toleru aŭ ni permesu, ke li kuŝu, ĉu li kuŝas aŭ ne en la momento, kiam ni esprimas la penson.

Estas rimarkinde, ke la infinitivo en tiaj okazoj, kiam ĝi ne estas anstataŭebla per taŭga participo, ĝi estas verba komplemento, aŭ pli bone dirite, elemento de verbo kompleksa.

En la propozicio «Ni lasu lin kuŝi», la verbo estas la esprimo «lasi kuŝi», kiun oni povas diri per unu vorto: «kuŝilasi» aŭ «kuŝ-lasi». (Oni ne devas diri «kuŝlasi» pro fonetikaj konsideroj, pri kiuj mi iam parolos).

«Lasi» estas la ĉefa elemento (tial oni skribas ĝin la lasta ĉe la kunmetita vorto «kuŝilasi» aŭ «kuŝ-lasi»), kaj «kuŝi» estas la komplementa elemento.

Paradigmo:

| | | | | | | | | | | | | |
|--------------|---|------------|---|----|---|------------|---|----|---|------------|---|------|
| Mi, ci, li, | { | kuŝil asas | } | aŭ | { | kuŝ- lasas | } | aŭ | { | lasas kuŝi | } | lin. |
| | | kuŝil asis | | | | kuŝ- lasis | | | | lasis kuŝi | | |
| ŝi, ĝi, ni, | | kuŝil asos | | | | kuŝ- lasos | | | | lasos kuŝi | | |
| vi, ili, oni | | kuŝil asus | | | | kuŝ- lasus | | | | lasus kuŝi | | |
| | | kuŝil asu | | | | kuŝ- lasu | | | | lasu kuŝi | | |

Hiperbatone¹ oni diras ekzemple,

¹ Pro hiperbatono. HIPERBATONO (Grek.=hypérbaton; Lat., Ang., Port. kaj Ger.=hyperbaton; Ital.=Iperbato; Franc.=hyperbate; Kast.=hipérbaton; Kat.=hipèrbaton) estas gramatika konstrua figuro, per kiu oni ŝanĝas la ordon de la vortoj en sintakse regula propozicio. Ekzemploj de propozicioj laŭ sintaksa aranĝo: «Antono aĉetis du belajn ludilojn por siaj ĉarmaj infanoj». «Mi aŭdis kanti ŝin». La samaj propozicioj kun hiperbatono: «Antono aĉetis por siaj du ĉarmaj infanoj du belajn ludilojn». «Mi aŭdis ŝin kanti».

«Mi lasas lin kuŝi» anstataŭ «Mi lasas kuŝi lin»
 «Ni lasu lin kuŝi» » «Ni lasu kuŝi lin».
 k. t. p. k. t. p.

* * *

En aliaj okazoj, la infinitivoj estas veraj substantivoj.

Ekzemploj: «Brili la suno estas bela spektaklo. Tamen, por avarulo, estas pli bele kalkuli monerojn».

Ĉiam oni devas preferi (preferdevas) la uzadon de la substantivaj formoj.

Ekzemple: «Brilado de la suno (aŭ Suna brilado) estas bela spektaklo. Tamen, por avarulo, estas pli bela la kalkulado de moneroj».

* * *

Infinitivo naskas participojn. Ekzemplo:

MANĜI: manĝanta, manĝinta, manĝonta;
 manĝata, manĝita, manĝota. Ankaŭ: manĝante,
 manĝinte, manĝonte; manĝate, manĝite, manĝote.
 Kaj ankaŭ: manĝanto, manĝinto, manĝonto;
 manĝato, manĝito, manĝoto.

Ĉiu el la ĉi supraj vortoj havas sian propran signifon.

Se oni volas trafe paroli, neniam oni ŝanĝu unu per la alia, eĉ nek per la infinitivo.

SAMUEL ROCA I RODÓ

Septembro de 1935^a

ĈU KULPO AŬ SORTO?

Kvardekdu-grada frosto rapidigis iliajn paŝojn. En la hirtaj, pezaj peltoj ili ambaŭ similis pli al paro da ursoj irantaj sur la postaj piedoj ol al homoj. Eĉ se la malmultaj stratlampoj lumus pli forte, vi vidus nenion de iliaj vizaĝoj, kiuj estis ŝirmitaj kontraŭ la glacia vento per starigitaj pelto-kolumoj. La paro pasis jam la periferiajn stratojn kaj celis nun al la urbocentro.

Ekpafo... dua, tria... silento.

—De kiam revenis la bolŝevistoj Siberion, regule ripetigas tiu ĉi mistera pafado. Kaj ĉiam, kiam vesperigas, —li siblis la vortojn tra la dentoj evitante malfermi la buŝon. Ili ankoraŭ pli rapidigis siajn paŝojn kaj glitis senbrue kiel ombroj laŭlonge de l'domoj.

—Diru, Aleĉjo, kiu do pafadas?

—La diablo scias. Dum la tago la bolŝevistoj estas la sinjoroj de l'urbo. Sed kiam krepuskigas, oni povus pensi, ke oni denove estas sur la fronto. Kaj neniŭ scias, kiu pafas kaj pro kio.

Nova pafado sur la alia flanko de l'largha strato subite haltigis ilian marŝadon. Senspire ili atendis kaj streĉe aŭskultis. En apuda strato respondis du-tri pafadoj. Hundoj ekbojegis. Poste ĉio silentigis, nenio aŭdigis. Vintra nokto pezis sur la neĝokovrita urbo. Ili singarde ekmarŝis. Aleksandro daŭrigis sian interrompitan respondon:

—Unuj diras, ke la ruĝuloj pafadas, por timigi la loĝantaron. La aliaj diras, ke kaŝitaj blankuloj pafadas, por montri al la blankemuloj, ke ankoraŭ ne estas ĉio perdita.

—Karulo, mi timas. Kiel ni revenos hejmen?

—Ne timu, Anjuta. Neniŭ oni trovis mortpafiton. Post la naŭa ĉio ekdormos, ankaŭ la pafado.

La duo atingis stratangulon kaj tuj dekstre sian celon: ĝi estis unuetaĝa domo, kies suba parto estis masonita. La etaĝo estis el dikaj, duonrondaj, lignaj traboj. La restaj ter-etaĝaj domoj de l'flanka strateto kaŭris timeme en mallumo kaj ili ŝajnis ankoraŭ multe pli malaltaj ol ordinare. Nur la etaĝaj fenestroj naive rigardis per sia flava lumo en la vintran nokton, kiel du grandaj nekompreneblaj okuloj de infano rompiĝintan ludilon.

—Dank'al Dio, ŝi flustris. Ne estas plezuro iri kontraŭ tiu ĉi glacia vento. Ĝi trablovas la korpon spite la pelton, kvaŝaŭ oni estus vestita per nura bankostumo. Kaj al ĉio ĉi la pafado... terure!

Piedfrapante la teron ili senigis siajn feltbotojn de l'neĝo kaj ekfrapis la pordon. Venis la mastro mem. Laŭtvoĉe li bonvenigis la gastojn kaj premis iliajn manojn, kiujn ili ceremonie sengantigis. En la antaŭĉambro la ursuloj senŝeligis kaj la kerno montriĝis juna eleganta paro. Antaŭ kelkaj tagoj ili geedziĝis. La mastro malfermis al ili la pordon de l'ĉambro. Ili eniris. Lumo kaj varmo akceptis ilin... kaj laŭta, senzorga babilado kaj rido. O jes, nenie en la mondo oni scias tiel hejti kaj agrabligi sian hejmon kiel en Rusujo kaj eĉ pli ankoraŭ en Siberio.

—Ni jam pensis, ke vi ne venos, kaj la afabla rideto de l' dommastrino elokvente montris, ke la juna paro estas bonvenaj gastoj.

—Ĉu estus miraklo, se jungeedzoj preferus resti hejme dum

sia mielmonato? respondis anstataŭe la mastro kaj akompanis sian bonvolan ŝercon per tondra ridego.

La alvenintoj, el kies okuloj ankoraŭ tro klare parolis la juna feliĉo, altabligrigis kvazaŭ ne aŭdinte. Sur la tablo, antaŭ la mastrino, zumis arĝenta samovaro. Kun danko ili akceptis la proponitan teon kaj kukaĵojn.

THEODOR KILIAN

(Daŭrigota.)

BIBLIOGRAFIO

Sveda Antologio. Dua vol. Sub redaktato de Sam. Jansson. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 204 paĝ. Prezo: broŝ. sved. kr. 4:—, tuttole bind. kr. 5:50. Du volumoj kune broŝ. sv. kr. 8:50, tole bind. sv. kr. 10:—.

Post la multepromesa unua volumo ni komencis legi kun granda atendo kaj atento la eksterajne same belan, duan volumon, dediĉitan al la sveda literaturo. Ties famuloj ja estas ĉiam inter la unuaj en la kultura konkurso de la mondo. Tuj ni povas diri: nia plezuro estas plena; la frazon, laŭ kiu «la Esperanta literaturo pliriĉiĝis per grandioza verko», oni iom foruzis, sed ĉi-foje ni rajte uzas la superlativon. La brava sveda Esperanto-movado pruvis, ke ĝi estas inda al tiu alt-nivela sveda kulturo, kies elektitaj perloj aperas en la Sveda Antologio kaj la laŭdo apartenas same al la ĉefa gvidanto de la laboro, rektoro S. Jansson, kiel al la entuziasma helpemaro, kiu laŭ demokratiaj principoj, ofte tro modeste (ekz. sub la kolektiva nomo «Gevleanoj, Ystadanoj») kunagante donacis al ni sendube gravegan kaj prifierindan verkon.

En la dua volumo ni renkontas la nomojn de novaj verkistoj, kies apero en la literaturo tamen estas antaŭ la jaro 1920. Kelkaj el ili estas ĝenerale konataj en la tuta mondo, unuavice Selma Lagerlöf, kiu per kvar bonege elektitaj majstraĵoj estas reprezentita. El la prozverkistoj ni nepre devas mencii la — bedaŭrinde tro frue mortintan — Pelle Molin, kies noveloj estas tute unikaj kaj el la belaj, eble la plej bela estas la «Danco kun urso». Sed la epizodisto Albert Engström, kiu ne timas eĉ la profundon de la homanino, la filozemaj Ellen Key kaj Hans Larsson, la melankolie rezigna Hjalmar Söderberg, la iom pesimisma Sigfrid Siwertz kaj la komikajn kaj tragikajn momentojn tiel majstre unuiganta Hjalmar Berg-

man same kaptas nian intereson, plaĉon kaj ŝaton. La nombro de la bravaj tradukantoj (koncerne la prozaĵojn) estas tiel granda, ke neeble aparte mencii ilin. Ne malpli prikoninda kaj ĝuplena legaĵo estas la kolekto de la poeziaĵoj, kiu prezentas al ni la poezion de Fröding, tiu ĉi individue profunda animo, la klarajn, serenajn, nur kelkfoje nubigantajn bildojn de Karlfeldt, la sentoplenajn kantojn de Bo Bergman kaj la subtilan lirikon de W. Ekelund kaj Anders Osterling. La tradukaĵoj ĝenerale estas tiom belaj, ke ni ne preterlasas la okazon mencii la kvar eminentajn tradukantojn, Magda Carlsson, kies nomon ni plej multfoje trovis sub la poemoj, Stellan Engholm, pri kies tradukaĵoj jam estas preskaŭ superflue ripeti la laŭdojn, Gustav Johansson, kiu kelkfoje atingas la plej altajn regionojn de la poeziaj esprimoj kaj Varma Thilander, kies forto estas la virina subtilo.

La Esperantistaro ŝuldas per multe da dankoj al ĉiuj kunlaborintoj de tiu ĉi vere altvalora verko. — NENIU.

HELPANTA TEMARO, de Julio Mangada Rosenörn, eldonita de H. E. A. — Jen libro celanta instruan rolon, kiu, bedaŭrinde, ne estas verkita en simpla stilo kaj korekta Esperanto, kio estas necesa por rekomendi ĝin al kursanoj kaj lernantoj iom progresintaj en nia lingvo. Sed, kontraŭe, la verkaĵo de Sro. Mangada ŝajnas pruvi, ke, por li, Esperanto estas malfacila afero. Kompreneble, la Zamenhofa lingvo, eĉ por Julio Mangada, estis certe facila, kiam li simple celis komprenigi sin de alinacianoj. Sed io estas tia mirinda solvo aŭ utilo de Esperanto por ĉiuj, kaj io alia estas profunda scio de la lingvo por verki literaturaĵon modela por lernigo aŭ por instrua legaĵo. Eble iam la ilustraĵoj enhavataj en tiu libro estos utiligataj por nova korekta kaj malpeza lingvaĵo, kaj tiam la verko estos plene rekomendinda. — D. G.

SANGO KAJ SABLO. — Vicente Blasco Ibáñez. El la hispana lingvo tradukita de Ramon de Salas Bonal; eldonita de Aragona Esperanto-Federacio. Paĝoj: 231, kun kolorriĉa koverto. Prezo: 8,50 ptoj. Mendu ĉe la tradukinto, strato Cervantes, 5, Zaragoza.

Grandan taskon prenis sur sin nia samideano Sro. de Salas per la traduko de unu el la plej famaj romanoj de Blasco Ibáñez, tiu aŭtoro antaŭ nelonge malaperinta kaj sendube la plej konata en eksterlando. *Sango kaj Sablo* estas romano pri tipaj hispanaj moroj, hodiaŭ, kiel prave diras la tradukinto, aŭ malaperintaj aŭ oaldaŭ malaperontaj, sed bele kaj kolo-

re, majstre priskribitaj. La travivaĵoj de la toreadoro Johano Gallardo kun liaj unuaj triumfoj, lia gloro en kaj ekster la areno, lia dekadenco kaj morto pro taŭrvundo estas vere allogaj kaj la aŭtoro ja simpatiigas lin al ni. La priskribo de la taŭroludoj kaj tiu de la fama Sevilja Procesio estas ankaŭ verkitaj kun granda vervo kaj arte. Sed ĉu mi devus tie ĉi paroli pri la lerteco de Blasco, kiu kiel rakontisto estas jam perfekte konata ne nur en Hispanujo sed ankaŭ eksterlande? Mi povas nur aserti, ke tiu, kiu komencos la legadon de la romano, neniel forlasos ĝin ĝis la fino kaj ankoraŭ bedaŭros, ke la libro enhavas tro malmulte da paĝoj.

Mi gratulas la tradukinton, ke li entreprenis tiel gravan kaj malfacilan taskon per kiu li konigos la hispanan literaturon al la esperantista publiko.

Kun la celo ke la tradukinto okaze aŭ de nova eldono, kiun ni dezirus baldaŭa, aŭ de nova verko uzu tute korektan lingvaĵon, mi volas fari kelkajn riproĉojn pri la lingvo: La plej grava laŭ mia modesta juĝo, estas la tro ofta, sistema mi dirus preskaŭ, forpelo de la pronomoj en la verboj. Ĉu la tradukinto tion faris por adaptiĝi kiel eble plej multe al la hispana konjugacio? Tiun konstantan foreston de la pronomoj ne permesas la esperanta gramatiko kaj la tradukinto devis atenti ke tio malfaciligas la komprenon de la lingvo kaj sekve estas tia sintenado malbona por la verko mem.

Malpli gravajn mi rimarkis: la uzon de nek eĉ anstataŭ la korekta eĉ ne, kiel se anstataŭ la vorto kvazaŭ, amoro anstataŭ amo, la trouzon de la prepozicio je, kelkajn erarojn en la uzo de la refleksa pronomo, kelkajn ne-transirajn verbojn kun akuzativo. Mi ne ŝatas ankaŭ la konstantan tradukadon de la propraj nomoj kiel ekzemple *Pastejo al Kastilanino*. Ankaŭ pri la traduko de profesiaj vortoj de la taŭrarto inter kelkaj tre trafe tradukitaj troviĝas aliaj ne tiel bonaj.

Malgraŭ ĉio, makuloj facile forigeblaj kaj precipe eviteblaj en nova eldono. Tamen la verko estas tiel interesa kaj oni ĝin legadas kun tia avideco, ke la makuletojn apenaŭ oni priatentas.

Mi ripetas tion, kion mi skribis antaŭe: la tradukinto meritas dankon pro la grava kaj peniga tasko, kiun li entreprenis; la hispanaj samideanoj aĉetu la libron por kuraĝigi la tradukinton, ke tio ne estu la unua kaj lasta el la tradukoj el la riĉa hispana literaturo; la eksterlandaj esperantistoj ĝin aĉetos ankaŭ, se ili volas legi belan romanon, se ili volas koni

ekzotikajn morojn jam forpasantaj, se ili volas helpi, kaj tio ĉi ja estas ĝies devo, al la pliriĉigo de la internacia esperanta literaturo. — MARIAN SOLĀ.

ĈU SOCIALISMO KONSTRUIĜAS EN SOVETIO? (Biblioteko de Herezulo) de E. Lanti kaj M. Ivon. Formato: 14/21 cm. 52 pĝ. Prezo: 3 fr. plus sendkosto: 0,60 fr. (0'30 por la landoj aliĝintaj al la konvencio pri favora tarifo por libroj). Eldonejo: Esperanto, 14 av. de Corbera, Paris (XII). Poŝta ĉekkonto: E. Adam, Paris 1350-62. Respondkuponoj estas akceptataj.

Tiu verko estas unika en sia speco: ĝi konsistas el dialogo inter tri personoj: Futer, la herezulo, Ruper, la ortodoksulo, kaj Iver, la objektiva atestanto, kiu vivis dum pluraj jaroj en Sovetio, tie laboris, restante ĉiam en intima kontakto kun la simpla popolo, kaj forlasis la landon antaŭ ne-
longe. Tiu dialoga formo donas vivon kaj intereson al temo, kiu sen tio estus alirebla nur de fakuloj.

La preso, aranĝo kaj papero estas bonaj; se ni aldonas, ke la broŝuro estas ilustrita, konsidere la malaltan prezon, ĉiu, kiu ial havas intereson pri Sovetio aŭ socialismo, tiu ne-
pre devas posedi tiun vere valoran verkon, plenan je precizaj informoj kaj kongruaj argumentoj. — NENIU.

ENLANDA MOVADO

Vendrell. — La grupo «Frateco» elektis la jenan komitaton: Prezidanto, Sro. Salvador Esvertit; sekretariino, fraŭlino Anna Ferrer; vicsekretario, Sro. Francisc Solé; kassistino, fraŭlino Regina Riera; bibliotekistino, fraŭlino Hermènia Romeu; voĉdonantoj, Sroj. Anaclet Bergés kaj Josep Urpi.

En la sidejo de la grupo klarigas kurson samideano S. Esvertit kun la partopreno de kelkaj lernantoj.

«Frateco» perdis unu el siaj plej bonaj anoj. Samideanino Maria Julivert forlasis nian vilaĝon kaj transloĝiĝis al Barcelona. Ni esperas, ke ŝi daŭrigos la laboron por Esperanto en tiu nova loko. Ni ĉiam rememoros ŝiajn fervorajn klopodojn por nia kaŭzo kaj ŝiajn laŭdindajn meritojn kiel tre lerta profesorino.

Dum pasinta somero nin salutis kelkaj samideanoj, kiuj traveturis nian vilaĝon okaze de diversaj ekskursaj karavanoj.

Lastatempe nin vizitis kelkaj gegrupanoj de «Bela Espero» el Manresa, kiuj kore invitis nin partopreni la proksiman Kongreson de KEF, kiu okazos dum Pentekosto en Manresa. La fratecanoj promesis klopodi aranĝi kongresan karavanon. — J. Marcè.

Ripoll. — La nova komitato de «Esperanto-Grupo Ripoll» estas la jena: Prezidanto, Sro. Ramon A. Soler; sekretario, Sro. Josep Lázaro; kasisto, F-ino Angela Casadesús kaj bibliotekisto, Sro. Joan Amils. La adreso de la grupo estas str. Donya Estàsia, 30, 1-er. La grupo malfermis du novajn kursojn kun sukceso.

Manresa. — Regas granda entuziasmo por la Kongreso de KEF, kies organizon prenis sur sin la loka grupo «Bela Espero». Per la mikrofono de Radio Manresa, ĉiudusemajne ni faras propagandajn paroladojn. Ni esperas, ke dank' al la anoncita Kongreso nia loka movado fariĝos eksterordinare potenca. — La Delegito.

Barcelona. — «Enciklopedia Akademio Espero» okaze de kvartalaj popolfestoj, organizis diversajn propagandajn kunvenojn kaj prelegojn, kiuj altiris grandan ĉeeston. Post tio komenciĝis sub la gvido de s-no Amadeu Planell nova kurso kun sukceso.

—La Bulteno de E. S. Nova Sento regule aperas ĉiumonate kun interesa enhavo. En la numero de julio ni rimarkis, krom trafa raporto pri la Kongreso de Ripoll, varman alvokon al la membroj de la societo por ke ili subtenu KEF.

Malfermiĝis du novaj kursoj dum septembro, unu por komencantoj kaj alia por progresintoj. Ambaŭ bone sukcesis.

—«Paco kaj Amo» malfermis siajn kursojn en la komenco de oktobro. La unuagrada kurso, sub la gvido de s-no S. Alberic, altiris 22 novajn adeptojn kaj la duagrada, gvidata de s-no Massacs Torrente, estas ĉeestata de 16 lernantoj.

Alacant. — Por la unua fojo ekzistas ĉi tie grupo, 21 membroj, kiu estas laŭleĝe registrita. Kunvenoj okazas ĉiunmerkrede, de la 19-a ĝis la 21-a, ĉe str. Torrijos, 41. — Artikoloj kaj anoncoj aperas en la lokaj ĵurnaloj.

Ĉe la unua leciono prezentis sin 14 lernantoj por la kurso gvidata de Sro. E. E. Yelland laŭ rekta metodo, ĉe la kvara leciono estis jam 28 partoprenantoj.



Mayoral-Pensiono

SITUANTA EN LA CENTRO DE LA URBO

Gvidas: E. CAPDEVILA

Bónega komforto — Pli ol 50 ĉambroj kun varma-malvarma fluanta akvo. — Telefono en ĉiu ĉambro — Centra hejtado.

Taga pensio, 13 pesetoj

ONI PAROLAS ESPERANTE

Rambla del Centre, 21-27
Plaça Francesc Macià, 1-2
(Enirejo tra strato Colom, 3)

BARCELONA
Telefono 14680

Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per Jaume Grau Casas

*La millor gramàtica en català
de la llengua Esperanto. Em-
pren-la en tots els curssets!*

Preu: 3'50 pessetes

Adrecen-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"

ESTATUTS DE LA FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA

Art. 1. L'agrupació general d'esperantistes en terres de llengua catalana, es dirà FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA, i, en esperanto, KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.).

Art. 2. La finalitat de la Federació Esperantista Catalana, és la unió d'entitats i individus esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, i, també, donar compliment als acords i Consells que afectin la collectivitat, procedents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del doctor Zamenhof.

La Federació Esperantista Catalana, sempre que les circumstàncies econòmiques li ho permetin, s'adherirà, pagant la quota corresponent, a la «Konstanta Re prezentantaro de Naciaj Societoj».

Art. 3. La Federació Esperantista Catalana estarà integrada de membres actius i protectors.

Per a la classificació dels actius, caldrà tenir en compte el que se segueix:

Els socis actius seran dividits en socis collectius i individuals.

Els socis actius pagaran, per mitjà de l'entitat llur i per cadascun dels socis que aquesta tingui, una quota de 0,30 ptes. trimestrals.

Els socis individuals que acreditin pertànyer a una entitat esperantista, no adherida a la Federació, pagaran solament una quota de 1'20 ptes. anuals.

Els socis individuals pagaran una quota de dues pessetes amb cinquanta cèntims anuals.

Els socis protectors (individus o entitats), pagaran una quota de 12 ptes. anuals com a mínimum (1).

Art. 4. La Federació Esperantista Catalana, estarà regida per una Junta renovable cada any, composta de: President, vice-President, Secretari, vice-Secretari, Caixaer, Comptador, Bibliotecari i dos vocals.

Art. 5. La Junta de la Federació Esperantista Catalana convocarà, almenys un cop cada any, si és possible en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, els seus associats en Assemblea o Congrés general, en el qual, previ l'ordre del dia, es donarà compte als federats dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant el temps del seu exercici; serà acordat, si és possible, el lloc on s'haurà de celebrar el pròxim Congrés o Assemblea; seran nomenats els individus que hauran de formar part de la Junta per al següent exercici i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades 30 dies abans del Congrés o Assemblea, i, si és possible, que hagin estat publicades a la revista i incloses en l'ordre del dia.

Art. 6. La Junta permetrà la constitució de seccions dintre de la Federació.

Aquestes seccions, que podran ésser de caràcter ben autònom, hauran de regir-se per un Reglament interior en el qual siguin cedit, com a mínimum, dos càrrecs, en els corresponents Comitès de Secció, al Comitè Directiu de la Federació.

Art. 7. Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria de vots dels socis assistents. Les modificacions que puguin ésser presentades a aquest Reglament, hauran d'ésser-ho amb l'antelació deguda a fi d'incloure-les en l'ordre del dia i estar publicades en la seva totalitat, puix que solament podran ésser discutides i estudiades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. 8. Tots els socis actius, individuals o collectius, tindran veu i vot en les Assemblees o Congressos generals on assisteixen.

Art. 9. Aquesta Federació Esperantista Catalana podrà actuar mentre tingui adherides dues entitats o 30 membres individuals. En cas de dissolució, previ acord de la Federació Esperantista Catalana, els fons existents o que resultin de la liquidació, passaran a la «Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado» domiciliada a Ginebra, per a la propaganda de l'Esperanto. Si aquesta entitat central no existia en els moments de la dissolució, podrà, la Junta General de socis, acordar la destinació dels fons i objectes en existència.

Article transitori. La Federació Esperantista Catalana estarà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245, entresol.

Barcelona, 6 d'agost del 1930.

(1) Tots els socis pagaran a més ptes. 1,25 anuals per la quota d'U. E. A.